

# O BRASIL — ESPERANTISTA

ORGÃO OFICIAL DA "LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA" — Sociedade de utilidade pública.

NOVA FASE DO "BRAZILA ESPERANTISTO"

ANO 42 — N.º 124 — 126 (410-412)

Telegrafa adreso: ESPERANTOLIGO

ABRIL — JUNHO, 1948

Diretor: A. Caetano Coutinho  
Redator responsável:  
Dr. Carlos Domingues  
Telefone — 42-4357

Administração e redação:  
Praça da República, 54-sob.  
Rio de Janeiro — Brasil

Gratuito para os sócios da Liga  
Eksterlande: Unu dolaro aŭ 15  
respondukuponoj.

## LA NOVA EPOKO — "LA EPOKO DE LA TUTMONDECO" KAJ ESPERANTO

### KONFERENCO

Invitita de Brazila Ligo Esperantista, la eminenta S-ro D-ro M. A. Teixeira de Freitas, faris notindan kaj tre aplaŭditan konferencon, sub la aŭspicioj de la Kultura Departamento de Clube Militar, kaj sub la prezidanteco de Generalo Wolmer da Silveira, la 16-an de Junio.

Ĉi tie ni publikigas la titolon de la Kapitroj, kaj la finan parton de la Konferenco.

1. Tri malsamaj aspiroj kaj unu sola vera idealo. — 2. La universala lingvo. — 3. Rebata respondo al Babela Turo. — 4. La vorto -voĉo kaj lumo de la tutmondeco. — 5. Esperanto kaj la novaj vojoj de la civilizacio. — 6. La tutmonda oficialigo de Esperanto. — 7. Edukado kaj Kulturo al ĉiuj, pere de Esperanto. — 8. Esperanto kaj la tutmonda paco. — 9. Brazilo, probatalanto de la paco kaj interkomprenigado universalaj.

### BRAZILo, PROBATALANTO DE LA PACO KAJ DE ESPERANTO

Kaj nun ni povas jam bone vidi kun klareco. Labori por la venko de la internacia lingvo, klopodi por la aliigo de la ekonomiaj kaj spiritaĵaj valoroj, kiujn tiu granda historia faraĵo povas alporti al la homaro, estas labori por la monda paco. Estas kontribui al la paco de ĉiu popolo kaj al la paco inter ĉiuj popoloj, estonte. Labori por tiu idealo estas teksti la nuntempan sekurecon de ĉiu nacio aparte, kaj de ĉiuj nacioj de la Tero, solidare.

Nu, ĉar tiuj kiuj laboras por la nacia sekureco rajtas esti aŭskultataj, tial ke



De maldekstre: Prof. Arnaldo Santiago, da Sociedade Brasileira de Geografia; prof. J. Carneiro Felipe, direktoro de Serviço Nacional de Recenseamento; prof. J. B. Melo e Souza; D-ro M. A. Teixeira de Freitas; Generalo Wolmer da Silveira, vic-prezidanto de Clube Militar; D-ro Rafael Xavier, generala sekretario de Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística; S-ro A. Caetano Coutinho; D-ro Carlos Domingues.

ilia voĉo havas la aŭtoritaton kiu devenas de iliaj altruismaj idealoj pri la kolektiva bono — la parolo de homoj kiel vi, Sinjoroj, sin altrudas efektive kun elstara signifo, al la lukto por la nobla idealo pri pli bona kaj pli feliĉa homaro, dank'al universa superregado de fortoj de la bono, estigitaj de nesuperebla ilo je tute novaj eblecoj.

La subluma aspiro kristana — unu grego kaj unu paŝtisto — estos ebla nur kiel sekvo de la unueco de la Verbo, de la interkomunikigo de ĉiuj gentoj. Kaj ni vidas ke la venko de la lingvo internacia kiu aperis sub la signo de la Espero, kies "stelo" alportis al ĉiuj bonvolaj homoj la mesaĝon pri paco inter

la popoloj, kaj pri la feliĉo al ĉiuj nacioj, estas la vojo jam pretigita, ebenigita, arboplantita, floranta, tra kiu povas la Homaro marŝi fide, ĝoje kaj trankvile al sia luma idealo pri komprenigo kaj kooperado. Do, estas nia afero klopodi por ĝia venko.

La obstino, la kuraĝo, la misiista spirito de la pioniroj ĉiam estas realigintaj ia plej grandajn mirigindajn fariĵojn de la civilizacio, superante la plej penigajn neatenditaĵojn, la laŭaspekte plej timigajn obstaklojn.

Kaj la spirito nepre venkis, kiam ĝi sciis subteni siajn rajtojn. Ĝi venkis ĉiam, do same ĝi venkos nun, pri la dis-

(daŭrigo sur la 2.<sup>a</sup> paĝo)

## La Nova Epoko — “La Epoko de la...

(daŭrigo de la 1.<sup>a</sup> paĝo)

konigo de la helpa lingvo, la adopto de Esperanto, kiel rimedo kaj helpilo por ke ĉiuj homoj, hodiaŭaj kaj estontaj — denove povu “paroladi” kun la spirito de Dio, en la pleneo de la Universala Harmonio, en la ĝuo de tiu rajto — kiel estas en la Biblio — donita al la unua homo, antaŭ la falo en la nekomprenon, en la envion, en la malkonkordon, en la malamon...

Brazilo, tiom per individua iniciato, kiom per registaraj decidoj, estas plenumanta elstaran rolon rilate la propagandon de Esperanto. Ĝi partoprenis en internaciaj kongresoj kiuj firmigis la solidarecon inter la esperantistoj kaj subtenas la flamon de la komuna idealo. En ĉi tiu lando mem oni jam efektivigis dek-unu naciajn kongresojn. Brazila Ligo Esperantista kaj multaj aliaj propagandaj asocioj faris admirindan laboron pri edukado kaj publikeco.

Rilate al turismo poŝta kaj telegrafa komunikoj, komerca propagando, radio-sendado, statistiko, ĉiuspecaj kulturaj agadoj, estas jam grava la uzado de la helpa lingvo inter ni. Ĝin parolas kaj skribas miloj da brazilanoj. Oficialaj kaj privataj lernejoj starigas nedevigajn kursojn.

En memorinda decido la Nacia Konsilantaro de Edukado agnoskis la neceson de la instruo de Esperanto en la publikaj lernejoj. La Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko adoptas Esperanton en siaj teknikaj verkoj, revuoj kaj propagandaj publikaĵoj pri Brazilo. Kaj ĉi tie vivis plej grandanima viro konsekrita tute al nobla idealo de la Helpa Lingvo, unu el la plej grandaj apostoloj de la movado esperantista en la tuta mondo: Alberto Couto Fernandes. Honoro nepereema estu al li!

Ĉu estas troe aspiri ke, pere de brazila iniciato aŭ de propono de la Brazila Registaro, oni adoptos Esperanton por la internaciaj rilatoj? Ĉu estas troe ke la solidareco de Brazilo, aŭ eĉ ĝia iniciato aldonita al aliaj proponoj, kapablos igi venkanta la helpan lingvon, kaj liveri al la mondo tiun nepran ĉefan kondiĉon por la vera homara frateco?

Brazilo deklaris malakcepti militon kiel agadan rimedon politikan kiun ĝi povus uzi por decidi siajn malkonsentojn kun aliaj landoj. El la militoj kiuj estas altruditaj al ĝi, Brazilo ne volis elpreni ian profiton, se ne restarigi la justajn rilatojn en la internacia kunvivado.

La Brazila Nacio, tiel, havas neneigblan aŭtoritaton instigi ĉiujn movojn profite al paco kaj homara solidareco,

ĉu en la agadkampo de nia Kontinento, ĉu en la tuta terglobo. De nia tre amata patrujo multon atendas — kaj multon havigos — la supera afero pri la internacia lingvo.

Kuraĝe, do, karaj samlandanoj, kuni-dealistoj! Ne senfortigu nia entuziasmo al tiu certe plej alloga luktado de la homo sur la Tero. Kvankam multaj, ni ne estas ankoraŭ sufiĉaj por konduki la okazaĵojn. Sed la cirkonstancoj en la nuntempa situacio konkeros ĉiujn Naciojn je nia celado. Ĉi tiuj vidos nian lampon ekbruligita. Kaj tiu lampo, aliformigita baldaŭe en potencan lumturon plene lumigos la novajn vojojn de la homaro.

Kristo venkis la Mondon. Kaj la respondo de la Homo al Lia misio pri paco inter ĉiuj bonvolaj homoj — Esperanto, la Universala Voĉo de la Homaro — ankaŭ superregos. La Mondo, apogita al la Verbo de Dio kaj al la Verbo de la Homo, venkos sin mem. Detruante la malamon kiu freneze ekposedis lin, li travivos, universale kaj vere, la Liberecon, la Fratecon, la Justecon. Tiel, regos la paco sur la Tero, la Homo estos unika familio kaj konos la konfidon, la ĝojon, la feliĉon.

## LA DUA DEVO

En nia antaŭa numero aperis artikolo pri la unua devo de esperantisto: ellerni la lingvon. Ĉiu homo, komprenanta la gravecon de la ideo de lingvo internacia, plene posedi ĝisfunde la komunan lingvon, ĉar vortoj flugas for, sed faktoj restas kaj ekzemplo fruktodonas. Ni propagandu per seio de la lingvo per ekzemplo de ĝia praktika uzado. La graveco de Esperanto venas ĉefe de tio, ke tra la mondo ekzistas homoj sufiĉe bone scipovantaj la lingvon kaj ĝin uzantaj parole kaj skribe. Tiaj perfektaj esperantistoj estas la vivo de nia ideo, ĉar ne per teorioj, sed per faktoj ili jam solvis la babelan problemon: ili senerare kaj elegante paroladas dum niaj kongresoj, konversacias kun alilingvanoj, skribas leterojn, artikolojn, librojn en korekta stilo kaj tiel ili montras al la mondo, ke la malbeno de Jehovo jam forpasis por diligentaj homidoj.

Perfekta esperantisto jam de nun vivas en la brila estonteco: li uzas mondscale la lingvon de la homaro, por doni kaj ricevi instruojn, por fari negocojn, por esplori la animon de siaj homfratoj en ĉiuj landoj kaj malkaŝi al ili sian propran animon. Jen ekzemplo: La bulgara lingvo kaj nacio estas de ni en Brazilo tute nekonataj, sed perfekta

bulgara esperantisto, Ivan H. Krestanov, preparis du verkojn por malkaŝi Bulgarujon al la mondo: “Bulgaraj Lando kaj Popolo” kaj “Bulgara Antologio”. Dank'al la legado de tiuj libroj, brazila esperantisto konstatas kun ĝojo, ke la progreso de Bulgarujo estas tre rimarkinda, ke tiu popolo estas tre ĉarma kaj havas la samajn sentojn kaj aspiriojn de nia propra popolo. Nenio krom la bulgara lingvo apartigas de ni la bulgaran animon. Kiam bulgara verkisto aperas al ni en perfekta Esperanto, li estas tute simila al unu el niaj kleraj samlandanoj. La vivado, la kutimoj, la laborado, la gojoj aŭ suferoj, la familia organizo, la industrioj, la terkulturo, la lernejoj, la virtoj kaj malvirtoj en Bulgarujo kaj Brazilo estas tute samaj.

Sen Esperanto la bulgara kaj brazila animoj estas tamen du reciproke tute nekompreneblaj mondoj, ĉar la nacia lingvo de la bulgaroj estas slava skribata per rusaj literoj, tial ĉiuj ĝiaj vortoj kaj frazoj estas por ni mistero. En tuta libro bulgara ni trovas nenion vorton kompreneblan, ĉar eĉ la literojn ni ne komprenas. Sed lerta bulgara esperantisto povas senvualigi la misteron kaj montri al ni tute klara la bulgaran, ja tre belan, animon.

La unua devo de esperantisto estas do imiti nian samideanon Ivan H. Krestanov kaj malkaŝi antaŭ la aliaj popoloj la animon de sia nacio; sed por plenumi tiun devon, li (aŭ ŝi) devas perfekte posedi la lingvon internacian, ne nur supraĵe scii kelkajn vortojn kaj esprimojn de la ĉiutaga vivo en Esperanto.

La dua devo de ĉiu esperantisto ne estas malpli grava ol la unua. Se per la unua li agas kiel individuo, per la dua li agas multe pli forte kaj efike kiel ero de granda korpo, kies forto estas multe pli granda ol la sumigitaj fortoj de la individuoj ĝin formantaj.

Tiu devo estas kunlabori en la tutmonda movado esperantista per niaj organizaĵoj. Kiel aparta nacia movado Esperanto estus io tute nenececa kaj senutila, ĉar la nacio jam posedas sian lingvon kaj ne bezonas duan. La tutmonda esperantistaro, per Universala Esperanto-Asocio kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, estas nevenkebla armeo, marŝanta rekte al la fina venko, t.e. al la kreo de tutmonda homaro, laboranta kiel unupeco maso por sia propra feliĉo, aŭ, pli poezie, por la formado de “unu granda rondo familia”, entenanta ĉiujn individuojn de la Planedo.

Ĉiu honesta esperantisto nepre devas ĉiam klododi por fortigi la tutmondan esperantistan movadon, ek de sia grupo, de la nacia organizaĵo ĝis la ĝenerala institucio, U.E.A. En la plenumado de tiu supera, sankta devq simpatioj aŭ antipatioj personaj ne povas ekzisti. Ĉiuj detaloj pri persona gusto aŭ sento malaperu antaŭ la plej alta devo de tutmonda kunhelpado por la venko de la ideo.

La forto de Esperanto kuŝas en ĝia mondampleksa organizado. Ĝi en aparta nacio ĝi povas esti persekutata, malpermesata, kiel okazis de 1933 ĝis 1945 en Germanujo kaj

poste en la teritorioj okupitaj de la nazioj; sed la samideanoj persekutitaj kaj perforte silentigitaj scias, ke la tutmonda movado daŭras plu kaj ke iam tia mondforto venkos la enlandajn persekutantojn; tial ili restas fidelaj al la ideo kaj ĝin konservas viva, kvankam kaŝita, en la koroj. Dun la nazia reĝimo en Germanujo niaj samideanoj multe suferis, sed ili konsciis, ke per laboro en aliaj landoj la movado ne mortos. Ili kaŝe laboris kaj prosperis en maniero nevidebla por la tiranoj. Kiam la reĝimo falis, la movado reaperis forta kaj entuziasma, malgraŭ la malriĉeco de la popolo. La unua germana kongreso post la milito estis grandioza sukceso: du mil samideanoj tuj aliĝis; en diversaj universitatoj aperis la instruado de la lingvo.

Iu povas opini ke lia grupo ne estas perfekta, ke la nacia organizaĵo ne funkcias kontentige, ke U.E.A. ne estas ideale perfekta, ĉar ĉiuj homaj verkoj estas efektive neperfekta: nur Dio estas absolute perfekta. Sed malgraŭ neperfekteco laŭ detaloj, la kunigo de fortoj mondscale per U.E.A. estas io nevenkebla. Nur ĝi povas labori en tutmonda harmonio kaj gvidi nin al la fina venko.

Milionoj da homoj ne organizitaj reprezentas nenian forton kaj estas facile venkeblaj de malgranda armeo bone organizita. Nur per organizo la homoj povas efike agi kaj trafi difinitan celon. Ankaŭ en nia movado la individuaj fortoj povos atingi sian celon nur per harmonia, sistema kunlaborado.

Sekve, la dua devo de ĉiu esperantisto estas aliĝi al Universala Esperanto-Asocio pere de sia grupo kaj de nacia asocio, se tiaj ekzistas en lia lando, aŭ rekte al U.E.A., se tiaj ne ekzistas.

En Brazilo la plej facila kaj ankaŭ la plej efika vojo estas aliĝo al U.E.A. per aliĝo al grupo aŭ loka societo, kaj de tiu al Brazila Ligo Esperantista, kiu peras aliĝojn al U.E.A.

Lerni la lingvon kaj eĉ instrui ĝin al aliaj ne sufiĉas, se tiaj individuoj ne kreas novan forton por la tutmonda Esperanto-movado per aliĝo al nia tutmonda organizaĵo, t.e., al U.E.A.

Certe ĉiu grupo deziras havi sian bultenon por aperigi la nomojn de siaj membroj, montri, siajn gravajn laborojn. Tia ambicio estas tute homa, tute natura, sed rekte malutila al la movado, ĉar tiaj bultenoj ordinare postulas oferojn, kiuj povus doni pli bonajn fruktojn en nacia aŭ internacia organizaĵo. Ili estas disigo de fortoj, dum nia devo estas kunigi niajn penojn, pensi kaj labori pli por ideo ol por personaj briletoj sensignifaj, neutilaj aŭ eĉ tute malutilaj.

La plej multaj el tiuj bultenoj havas mallongan vivon, ĉar oni komencas ilian aperadon facilanime, sen financa bazo, nur por kontentigi glorsoifon de ĵus hakitaj esperantistoj, kiuj ĝuste la kontraŭon trafas per sia gazeteto: anstataŭ famo de esperantista verkisto, kiun ili esperis, ili perdas sian nomon en Esperantujo, eĉ se pli malfrue ili ellernas la

lingvon kaj konatiĝas kun la movado, por verki ion seriozan.

Kiom da ĥonegaj energioj jam perdiĝis en nia movado kaŭze de troa ambicio de junaj samideanoj!

Ne rapidu por vanta montriĝado! Aliĝu al la movado, laboradu honeste, kaj iam venos al vi la tempo aperi kiel lertaj verkistoj, majstroj de la lingvo kaj seriozaj laborantoj. La kokido ne elrampu tro frue el sia ovŝelo!

Plenumu la unuan kaj la duan devojn: poste venos la tria kun brilo.

*Kristano Hagarido.*

## SECRETARIA GERAL DO I.B.G.E.

Por motivo de saŭde, deixou a Secretaria Geral do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, que vinha exercendo desde a fundação, o nosso querido amigo Dr. M. A. Teixeira de Freitas, a quem nos liga um infinito reconhecimento, que ainda uma vez proclamamos, pelo muito que tem feito pela causa da difusão do Esperanto.

Substituiu-o outro ilustre brasileiro, o nosso distinto amigo, Dr. Rafael Xavier, em cujo mandato esperamos continuar a receber do I. B. G. E. o mesmo inestimável apôio e colaboração.

## ESPERANTO KAJ RADIOFONIO

La Radiostacio de Ministerio de Edukado kaj Saneco, daŭrigas la esperantajn dissendadojn, Ĝiulunde, je la 13,10 ĝis la 113,40 horoj, per mezaj kaj mallongaj ondoj (375 m kaj 30,71m).

La radio-komunikon redaktas kaj parolas D-rino Ilka Duque Estrada. En

la programo estas muzika parto, kiu disaŭdigas esperantajn kantojn, per diskaro, kiun Brazila Ligo Esperantista klopodas organizi, kun la bonvola partopreno de konataj brazilaj kantistoj. Ni jam gravurigis diskon kun la voĉo de la sopranulinoj Iná Verney Lindberg kaj Iara Álvares Coelho, kaj de la baritono Asdrúbal Lima.

## LIGA ESPERANTISTA BRASILEIRA

### Assembléia geral

A Liga Esperantista Brasileira realizou a primeira assembléia geral ordinária do corrente ano, em 25 de Abril, sob a presidência do Dr. Carlos Domingues e com a presença dos delegados da quase totalidade dos grupos filiados.

Leu-se o Relatório referente ao ano de 1947, que também foi apresentado ao Ministério da Educação e Saúde. Os assuntos relatados já são do conhecimento dos sócios, ou porque constaram do anterior Relatório, apresentado à assembléia de 15 de Setembro de 1947, durante o XI Congresso, ou porque se acham registrados no órgão oficial.

Igualmente foi lido o balancete, apresentado, com as contas, pela Tesoureira, D. Irani B. de Araújo, e publicado em nosso último número.

O Relatório e as contas foram aprovados por unanimidade.

Comentando alguns dos assuntos ventilados no Relatório, falou o Sr. Ismael Braga.

A assembléia aprovou unanimemente uma proposta dos Srs. A. Caetano Coutinho, Carlos Domingues, F. Ferreira da Costa Filho e Ismael Braga, para que se conferisse ao nosso samideano Sr. Levino Fânzeres o título de Sócio Benfeitor.



La estraro de la malferma Kunsido de la 1<sup>a</sup> Konvencio Esperantista de Minas Gerais. De maldekstre, la dua, la ĉefurbestro de Belo Horizonte (raporto en nia lasta numero).

## “UNT” E “UT”

De um distinto “samideano” recebemos consulta a respeito das terminações “unt” e “ut”, que se poderiam empregar com o mesmo direito que as dos participios. Com muito prazer respondemos a esta consulta, de acôrdo com o nosso pessoal ponto de vista.

Reparemos, em primeiro lugar, que as terminações “regulares”, “normais” dos participios se relacionam com os “tempos”, e não com os “modos”; **filologicamente**, portanto, não haveria cabida para nenhuma outra terminação, que, com efeito, só poderia ser de um “modo”: infinitivo, condicional ou subjuntivo (incluindo-se neste o imperativo, que tem, em Esperanto, a mesma forma que o subjuntivo).

Em segundo lugar, as pretensas terminações “unt” e “ut” teriam o direito lógico de pertencer, tanto ao condicional, quanto ao subjuntivo (e ao imperativo). Porque haveríamos de dar privilégio ao condicional — não compreendo; será porque, **por convenção**, venha antes do subjuntivo, na lista dos modos? indicativo, condicional, subjuntivo...? ou porque termine em s como o indicativo?

Assim sendo, “kantuta” poderia significar “estus kantata, kantita, kantota” (note-se, de logo, a imprecisão) ou, de igual direito, “estu kantata, kantita, kantota” (nova imprecisão!). Numa palavra: “kantuta” exprimiria **seis** idéias! Também: “Laboro faruta”, que significa? “Trabalho que devemos fazer (“laboro, kiun ni faru”) ou “trabalho que faríamos (“laboro, kiun ni farus”), etc., etc.? Ainda: “Kanto kantuta” seria “canto que cantaríamos” ou “canto que cantemos” (que devamos cantar, que convém cantemos), etc., etc.?

Poderia argumentar-se, conforme eu mesmo costumo raciocinar: as palavras valem na frase. Por exemplo: “la glaso estis plenigita” tanto significa “o copo foi enchido”, como “o copo havia sido enchido”: ação e estado. Aqui, porém, **as duas idéias se confundem**, segundo expliquei no primeiro artigo sobre os participios em O BRASIL ESPERANTISTA; donde, há, forçosamente, que usar a **mesma** forma para indicar, por assim dizer, a **mesma** idéia: é isto que os partidários de “estis — ata” não vêem, ainda censurando o mestre da língua!

Com as pretensas terminações “unt” e “ut” seriam legítimas **duas** idéias **diferentes**, o que a própria filologia não tolera. Exemplo: “Nia unua faruta laboro estu la restarigo de la amo inter la popoloj” e “Nia unua faruta

laboro estus la restarigo...”: que parece?

Acresce que já se propôs (e alguns o usam) o sufixo “end”, que a L. K. sàbiamente rejeitou. Se, pois, fossem aprovados a terminação “ut” e o sufixo “end”, teríamos dous modos possíveis e indiferentes para exprimir “a fazer” (além da terminação “ot”...): “faruta” e “farenda” (além de “farota”...) p.ex.: Nia unua farenda laboro estu... “Uma beleza, pois não? Dir-se-á: mas “faruta” pertenceria só ao condicional, e eu pergunto: por que?!

Vejamos a seguinte série lógica:

“Legante la artikolon, li estis tute absorbita”.

“Leginte la artikolon, li jetis la gazeton en la korbon.”

“Legonte la artikolon, li sidiĝis pli komforte”.

E “Legunte la artikolon” — que significaria? “Se êle lesse...” ou “Devendo ler...”? Condição ou obrigação, conveniência?

Num prefácio de obra, podemos dizer: “Al la leganto”, i.e., “Àquele que está lendo (esta obra), ou “Al la legonto”, i.e. “Àquele que vai ler” (esta obra), porque o prefácio pode entender-se não pertença à obra mesma, em si. Mas, se alguém se lembrar de dizer “Al la legunto”, que terá em mente? “Àquele que lesse”? “Àquele que deva (seja obrigado a, a quem se recomende, a quem convenha) ler”? Se, portanto, se diz, por ex.: “Farunte tiun tradukon, mi petus vian helpon”, i.e. “Se mi farus = se mi petas...”, i. e. “êar mi devas fari...”

Voltando ao suposto sufixo “end”, seria interessante perguntar aos seus adeptos se se lembraram de forjar um sufixo correspondente para a voz ativa. P.ex.: “La vojo irend” = la vojo kiun oni devas iri; entretanto, não fosse a estrada que tivesse de ser percorrida, mas os **homens** que devessem ir, como dizem? Resposta:??, ou melhor, respondem, de orelha murcha: “la homoj kiuj devas iri”...

Cumpra não esquecer que uma língua não é quebra-cabeças; um dos característicos de sua perfeição é a clareza, e em Esperanto esta é das primeiras imposições e lhe deve ser a primeira virtude.

Resumindo, porém: uma razão sobreleva todas as demais: a própria filologia proíbe a adoção das intrusas terminações “unt” e “ut”; usá-las é ignorar o mecanismo dos idiomas, e isto basta. Deixemos que os poetas as empreguem; os filólogos, os que sabem que

## LEVINO FÂNZERES

Ni havas la plezuron publikigi ĉi tie la portreton de nia malnova amiko kaj samideano Levino Fânzeres, la konata brazila pentristo, kiu antaŭ multaj jaroj gajnis la vojaĝpremion ĉe nia Lernejo de Belartoj.

La sidejon de Brazila Ligo Esperantista riĉigas du artaj verkoj de Levino: la paŝtela portreto de D-ro Antonio Carlos Ribeiro de Andrada, kaj la antaŭnelonge inaŭgurita olea portreto de D-ro L. L. Zamenhof.

Nuntempe, Levino Fânzeres majstre direktas la laborojn de “Colmeia de Pintores do Brasil”, aro da junaj pentristoj, kiu ĵus faris la unuan ekspozicion de pentraĵoj sub libera ĉielo, ĉe “Passeio Público” (Publika Promenejo), en ĉi tiu ĉefurbo. ●



S-ro Levino Fânzeres

seja um idioma, os advertirão como Apelles ao atrevido sapateiro...

Queira sempre dispor dêste seu amigo, naquilo que o possa elucidar no estudo do querido Esperanto. Estudemo-lo e, principalmente, amemo-lo, porque, sem o verdadeiro amor pela obra do mestre (como todos os mestres, incompreendido), haveremos de excogitar mil defeitos, falhas, omissões, etc., que existem apenas em nossa apoucada mente. Só o estudo sério e o respeito pela obra podem conduzir-nos a esta única conclusão: o Esperanto é perfeito, no que de perfeito possa ter uma obra humana. Estudemo-lo a fundo, porque nas suas profundezas encontraremos as jóias que não percebe o olhar superficial do homem vulgar. Mas, sobretudo — amemo-lo!

Porto Carreiro Neto

# BRAZILA KRONIKO

**AMAZONAS — Manaus.** Festis la unuan datrevenon de sia fondo la Grupo Esperantista Verda Stelo. Krom la solena kunveno, kun paroladoj kaj deklamado de esperantaj poemoj, ia grupo organizis ekspozicion de esperantaj libroj, gazetoj, revuoj kaj poŝtkartoj, multe vizitatan kaj tre ŝatatan.

**SANTA CATARINA —** Ĉe Esperantista Klubo de Florianopolis komenciĝis III Perfektiga Kurso, kies profesoroj estas S-roj Giovanni P. Faraco kaj Eugenio Doin Vieira.

Aperigas artikolojn kaj sciigojn pri Esperanto, diversaj gazetoj, inter ili — "O Estado", "A Gazeta", "Diário da Tarde", "A Notícia".

Laŭ la dekreto n° 33, de 24-9-1947 E.K.F. ricevos de la Ŝtato la subvencion de 2000 kruzejrojn, jare. Ni gratulas E.K.F., pro ĉi tiu oficiala helpo.

Sekve de la ekŝigo petita de S-ro E. D. Vieira, E.K.F. havas nun kiel prezidanton S-ron Wanio José de Matos; kaj S-inon Aurea Bauer kiel sekretariinon.

**MINAS GERAIS — Ubá —** Rádio Sociedade Ubaense, kies direktoro estas D-ro Breno Dutra de Mendonça, permesis kurson de Esperanto, gvidatan de D-ro Antero Barroso, ĉiumerkrede, je la 20,30 horo.

Antaŭ kaj post la lecionoj parolas ĉe la mikrofono, pri la esperanta movado, niaj samideanoj José Gomes Braga kaj F-ino Edina Barros.

**Uberlândia —** La gazeto "Correio de Uberlândia" entenas bonegajn artikolojn pri Esperantismo, verkita de nia samideano Adair Peres Carvalho.

**RIO GRANDE DO SUL — Dom Pedrito —** La ĵurnalo "Ponche Verde" publikigas ĉiam informojn pri Esperanto. Nune ĝi entenas serion da artikoloj pri nia lingvo, verkita de S-ro Sady Fialho Fagundes..

**RIO DE JANEIRO —** Estas jena la nova estraro de la Esperanto-Klubo de Kristana Asocio de Junuloj en Rio de Janeiro:

Prezidanto, S-ro Jozefo Joels; ĝenerala sekretario, D-ro Alberto da Cruz Bonfim; unua sekretario, S-ro Raimundo Xavier de Menezes; dua sekretario, S-ro Oton Crespo Nunes; kasisto, S-ro Geraldo Loureiro Torres.

**PIAUI —** "Folha Estudantal", organo de Centro Estudantal Piauiense, enhavas artikolojn pri la organizado kaj movado de Esperanto kaj portugaliajn tradukojn de esperantaj verkoj.

**RIO GRANDE DO NORTE —** "Jornal da Manhã" presigis verkaĵon de S-ro Arlindo C. de Lima, pri la neder-

landano A. G. Henskes (Mirin Dajo), "la nevundebla homo", kiu tamen vundiĝis kaj ĵus mortis en Svisujo.

**SANTA CATARINA — "Lajes". —** Laŭ ni legis en "Antaŭen", organo de Esperantista Klubo de Florianopolis, fondiĝis esperantista klubo en la urbo Lajes, dank' al la klopodoj de D-ro Galileu Amorim. Partoprenas la unuan estraron ankaŭ F-inoj Wilma Machado Carrilho kaj Ruth Ghiorzi.

**Laguna —** La 25-an de aprilo, en la sidejo de Centro Cultural Antonio G. Cabral, kunvenis la esperantistoj kaj lernantoj pri nia lingvo, kaj fondis la "Esperantan Grupon de Laguna", sub la gvido de la esperantistoj S-ro Walter Boppré, D-ro Francisco R. Coelho, Sergio Boppré, José Machado kaj João José Vieira.

Oni povas multon esperi de ĉi tiuj viglaj samideanoj.

**SÃO PAULO —** "Programa Esperanto" estas presaĵo eldonita de Agência Livreira Esperanto Ltda., kiel propagandilo de nia helpa lingvo.

**Baurú —** La tiea grupo esperantista festis la 2-jaran datrevenon de sia fondo, per kunveno solena, kun paroladoj kaj deklamado de poezioj. Ĉeestis la kunvenon D-ro Helio Lemos Lopes, prezidanto de Centro Cultural de Baurú. "A Folha do Povo", loka gazeto, publikigis noton pri la festo. La grupo daŭrigas vigle propagandi nian lingvon, kaj faras du kursojn. Nia samideano Nabor da Graça Leite ĉiudimanche, je la 18-a horo, faras paroladeton pri Esperanto en la radistacio P.R.G. 8, de Baurú.

**PERNAMBUCO — Recife —** Esperanta Klubo Oliveira Lima (EKOL) estas grupeto de bonvolaj entuziasmaj lernantoj de Kolegio Nóbrega, kiun direktas la Jesuitaj Pastroj en Recife. La klubo aperigis sian organon "Ekol".

**RIO GRANDE DO SUL — Porto Alegre —** La nova estraro de Esperantista Societo de Porto Alegre, elektita okaze de la ĝenerala kunveno je la 3-a de aprilo estas: Prezidanto, Subkolonelo Wanderley F. Gonçalves; vic-prezidanto D-ro Benjamim Camozato; 1-a sekretario S-ro Ary Zamora; 2-a sekretario D-ro Ernani Corrêa; kasisto D-ro Tilly Pinto Tórelly; bibliotekisto S-ro Ivo Sanguinetti; Propaganda Fakto S-ro Alberto Flores; Instrua Fakto S-ro Boris Eston.

